n-ro 30

Aprilo 1990

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo

# La Merkato

## Broŝuro de IKEF

La *Komerca Terminaro, proveldono*, tre rekomendinda, konigas la ĝisnunajn rezultojn al pli larĝa publiko. Tiu ĉirkaŭ 85-paĝa broŝuro (formato A4) kun proksimume 1750 terminoj, ordigitaj laŭ la angla lingvo, kun tradukoj al la germana, hispana, franca, itala kaj **Esperanta** lingvo kostas 450 belgajn frankojn (plus sendkostojn: 50 frankoj en Eŭropo, 100 frankoj ekster Eŭropo). Mendu ĉe Roland Rotsaert aŭ ĉe Flandra Esperanto-Ligo aŭ ĉe via libroservo.

---

La Belga Esperanto-Federacio strategie pripensas la nuna situacio kaj la estonto de Esperanto. Fundamente oni konstatis ok demandojn:

1. Kion ni volas fari per Esperanto (ĝia estonto)?
2. Kion tio ĉi konkrete signifas?
3. Al kiu sin turni por agadi?
4. Kiel fari tion?
5. En kiuj kaj kiaj lokoj?
6. Kiom tio kostas?
7. Kiel financi tion?
8. Kiu faros kion?

Bonvolu respondi; viaj rimarkoj kaj ideoj estas petataj perpoŝte al: FEL, Frankrijklei 140, B-2000 Antverpen; telefone: +32.(0)3.2343400; telefakse: +32.(0)3.2335433

---

## Enhavo:

Estraro, sidejoj, kotizoj, kontoj kaj perantoj ............2
Saluton ....................................dk ............3
Malfermita letero de la Prezidanto ..........FJB ...........4
Financa raporto por 1989 ....................RR ............5
Spezokonto kaj Bilanco ......................RR ............6
Suplemento: Identecŝildaro ................. FXG .......meza
Administrado: Grava atentigo ... ...........FJB ...........8
Raporto pri la agado de IKEF ...............FJB ...........9
Bonvenon; Transloĝiĝintoj; Reklamtarifoj ................12

**La Merkato** estas organo de **IKEF**; ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

**La Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef **Braun** (FJB), Prezidanto kaj Generala Sekretario; S-ro Roland **Rotsaert** (RR), Financa Konsilanto; D-ro István **Gether**; S-ro François-Xavier **Gilbert** (FXG); D-ro Marco **Picasso**; S-ro Seikô **Yamasaki**; S-ro Daniel **König** (dk).
Revizoro por la financa raporto: D-ro Gianfranco **Polerani**.

**Centra sidejo**:
Ĉe s-ro Franz Josef **Braun**, Hornisgrindestraße 8, D-7580 Bühl 16, FR Germanio

**Financa sidejo kaj membro-administrado**:
Ĉe s-ro Roland **Rotsaert**, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio, *telefono:* +32.(0)50.330004

**Redaktora sidejo**:
Ĉe s-ro Daniel **König**, Schwarzwaldstraße 47 D-6800 Mannheim 1, FR Germanio, *telefono:* +49.(0)621.821710

La jara **membrokotizo** estas 400 belgaj frankoj, 20 nederlandaj guldenoj, 20 germanaj markoj aŭ 10 usonaj dolaroj. Ĉiuj, kiuj intencas kunlabori por subteni la klopodojn apliki Esperanton en komerco kaj ekonomio estas invitataj iĝi IKEF-ano. Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membrokotizo.
**Kontoj**: Ĉe UEA kaj ĉe FEL, kodo ikef-c,
*aŭ* ĉe Belga poŝtĉekkonto, Bruselo n-ro 000-1592629-83, je la nomo de IKEF, p.a. S-ro Roland Rotsaert.

**Perantoj**:
*Francio*: S-ro François-Xavier **Gilbert**, Vert Coteau, Longeville en Barrois, F-55000 Bar le Duc, (CCP 1275-89 L Nancy)
*FR Germanio*: S-ro Franz Josef **Braun**, Hornisgrindestraße 8, D-7580 Bühl 16, (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)
*Hungario*: D-ro István **Gether**, Berényi ul.8 I/6, H-1027 Budapest
*Italio*: D-ro Marco **Picasso**, via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro
*Japanio*: S-ro Seikô **Yamasaki**, 185 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, (Poŝtĝirkonto, n-ro 6-253232; Kotizo: 1400 enoj)
*Jugoslavio*: S-ro Sotir **Taleski**, ul. 'Oslo'br. 12, YU-91000 Skopje
*Svislando*: S-ro André **Piérard**, Chemin des Voirambeys, CH-3974 Mollens, (Poŝtĉekkonto, n-ro 19-33545-3)
*Togolando*: S-ro Gbeglo **Koffi**, B. P. 13169, Nyékonakpoé, Lomé



## Saluton

Estimataj gesinjoroj,
karaj gelegantoj,

certe vi rimarkis la novan titolpaghon de **La Merkato**; ghi montras alternativan emblemon por IKEF. Nia prezidanto, s-ro Braun, permesis al mi uzi tiun signon. Tiu chi titolpa^gho jam nur estas provizora. Vi, la membraro, estas petata priju^ghi la emblemon.

> Almenaŭ ekde la IKEF-kunveno en Rastatt, dum la 65a Germana Esperanto-Kongreso, IKEF pripensas la neceson de insigno. Pri tio raportis jam **LN** 17, sur pa^gho 1 (Julio 1987). Al la membraro tiu chi temo poste estis komunikita en **LN** 18 sur pagho 8, **LN** 20 sur pagho 4 kaj en **LN** 26 sur pagho 8 kaj 9.

Lastjare vi estis alvokita elekti el inter pluraj proponoj novan emblemon por nia fakgrupo. Bedaŭrinde la balotado tiucela ne esprimis klaran deziron de la plimulto de la mebraro. La vochoj donitaj domaghe disighis inter la pluraj proponoj, la emblemoj same plachis al la vocdonintaro. Mi serchis la devojn, kiuj estu pretendataj de nova emblemo kaj listigis ilin.

La emblemo esprimu racian klarecon.
> Komerca kaj ekonomia pensmaniero sin distingas per racia klareco.

Ghi estu nigra kaj blanka.
> Pro financaj celoj ni ne kreu signon, kiu devigus nin elspezi plian monon por kolora presado de leterpapero k.t.p.

Ghi ornamu la titolpaghon de **LM**.
> Gazeta organo kutime montras emblemon de sia grupo titolpaghe.

Ghi servu al la aktivuloj de **IKEF** kiel leterkapo.
> **IKEF**-anoj ne nur korependas inter sin. Ricevante leteron de **IKEF**-ano eksteruloj rimarku ekde la komenco, ke ghi rilatas al **IKEF**. **IKEF**-anoj uzu komunan (aŭ similan) leterkapon.

Ghi enhavu la plenan nomon de **IKEF**.
> Tro multe da societoj uzas tro kompreneble mallongigojn por iliaj nomoj, malgraŭ eksteruloj ofte ne scias la signifon. Tio ne okazu che **IKEF**.

Ghi konsistu el eroj, kiuj estas simple desegneblaj perkomputile.
> La komputilo ighis tute kutima laborilo. Emblemo, kiu plenumas tiun kondichon, ebligas posedantojn de komputilo aspekti oficiale kaj fakgrupe uzante kutiman blankan paperon.

La aktuala titolpagha emblemo ghenerale plenumas la taskojn laŭ tiu listo. Mi petas vian aprobon por ghi.

Agrablan legadon deziras Daniel König /dk

**Malfermita letero de la Prezidanto**

Estimataj gekolegoj,

IKEF ekzistas nun ses jarojn. Gi konstante evoluiĝis de 1984 fare de du iniciatoroj al nuna fakgrupo kun preskaŭ cent membroj. Impresa, ĉu ne? Cu vere?

Ci tiun leteron mi volas direkti precipe al la novaj membroj, al tiuj kiuj aliĝis dum la lastaj unu, du, tri jaroj. Kelkfoje oni demandis min: Kiun faras la estraro de IKEF por ni? Kian strategion ĝi havas? Mia respondo al tio ĉiam estis: Precipe la membroj faru ion koncerne la celojn laŭ nia statuto. La estraro kolektas spertojn, informas per la komunikilo, kunordigas aferojn, rekomendas aŭ instigas al farado de io. Sed IKEF vivu unuarange de la agadoj de opaj membroj. La celo de IKEF estas la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto sur la kampoj komerco, ekonomio kaj ekonomia scienco (ekonomiko). Mi supozas, ke ĉiu aliĝinta membro konscias pri tio kaj el tuta koro volas kontribui al tiu celo per propra agado.

Kion la unuopa membro povas fari? Li/ŝi povas tute sole agadi, ekzemple per uzado de Esperanto en sia ĉiutaga profesia laboro, per verkado de fakaj artikoloj por Esperanto-revuoj, per helpo en tradukservo, per havigo de reklamanoncoj al Esperanto-revuoj, aŭ li/ŝi povas kunagi kun aliaj membroj ekzemple en terminika/terminara laboro por krei fakvortaron. Kiel scientisto aŭ studento li/ŝi povas kunhelpi ĉe universitatnivela laboro.

Rekomendinda, ĉar plej efika estas agado kadre de sia ĉiutaga laboro. Tie li/ŝi havas siajn fortojn kaj spertojn, tie li/ŝi estos pli sukcesa ol en malkutima ĉirkaŭaĵo.

Aparta kampo malfermis sin al ni per la ŝtatoj en orienta Eŭropo ĵus liberigintaj sin de la komunisma jugo. Tie vivas multaj Esperantistoj. Ili bezonas helpon kaj konsilojn koncerne libermerkatan ekonomisistemon. Kiam ajn eblas, ni kontaktu ilin kaj provu komerci kun ili surbaze de la internacia lingvo.

Se vi sukcesis en iu agado, aŭ eĉ se vi malsukcesis sed gajnis valorajn spertojn, kiujn vi kredas utilaj ankaŭ por aliaj IKEF-anoj, sendu raporton al la redaktoro de "La Merkato". Tiaj informoj estas bona helpo kaj instigo por aliaj membroj.

Lasta propono mia: En la mezuro de nia kreskanta membronombro plidensiĝas nia membroneto. Per tio personaj kontaktoj plifaciliĝos. Kaj personaj kontaktoj inter IKEF-anoj miasperte estas ege valoraj por estiĝo de komuna IKEF-spirito. Ili ankaŭ donas gravan impulson por plia agado.

Mi ĝojus, se estonte " La Merkato" inundiĝus de informoj pri sukcesaj agadoj viaj.

Samideane via Franz Josef Braun



Financa Raporto por 1989

Sur la postaj paĝoj troviĝas la spezokonto kaj bilanco de IKEF je 89.12.31. Jen kelkaj klarigoj:

Komerca Terminaro: neta valoro je jarfino (kostoj minus vendosumo); restas 135 ekzempleroj; pago de ĉ. 3000 frankoj (kongresa libroservo) ne jam registrita (intertempe alvenis).
Eldono identecŝildaro: elspezoj 2921, enspezoj 2482, restis 15 ekzempleroj, nun preskaŭ elvendita.
Kapitalo dumvivaj membroj: korespondas kun ŝparkonto ĉe FEL; ricevas renton de tiu konto; el ĝi la kotizo de dumviva membro estas pagata.
Debitoroj/kreditoroj diversaj: kurantaj kontoj de estraranoj.

Dum la pasinta jaro IKEF unuafoje eldonis du broŝurojn. Enkalkulante la vendojn post la jarfino la enspezoj de Identecŝildaro kovris la elspezojn. La Proveldono de Komerca Terminaro - al kies financado helpis donaco de 20000 frankoj - estas plurjara investo. Se la vendoj daŭras kiel pasintjare, mi antaŭvidas ke IKEF baldaŭ rehavos la investitan kapitalon. Postaj vendoj estos gajno.

Pro malgranda restanta valoro, biblioteko kaj ekipajoj estis entute deskribitaj. Elspezoj pro terminologia laboro (precipe afranko) ekde nun estas aparte registrataj.

La lastaj numeroj de *La Merkato* estis kopiataj en 150 ekzempleroj. Ĝin ne nur ricevas la membroj, sed ankaŭ la E-gazetaro, E-centroj kaj informpetantoj. Prezo de fotokopiado sufiĉe rapide altiĝis je 50 % (de malpli ol 1 al 1,40 fr.), sed nun verŝajne restos stabila.

Roland ROTSAERT

Novaj aliĝoj post redaktofino:

104. Marc JEANNIER, F-83400 Hyères, Francio
105. Luis GILPEREZ FRAILE, Sevilla, Hispanio
106. Raymond LHERMITTE, F-56450 THEIX, Francio

# Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF)

**Spezokonto - Bilanco - Financa raporto por 1989 (la sumoj estas en belgaj frankoj; inter krampoj la sumoj de la antaŭaj jaroj)**

## Spezokonto por la jaro 1989

| Kostoj | 1989 | (1988) | (1987) |
|---|---|---|---|
| Ĝen. kostoj kaj deprezoj | 2 847 | (728) | (1 439) |
| Elspezoj pro term. laboro | 2 273 | - | - |
| Kostoj de "La Merkato" | 14 509 | (16 642) | (5 402) |
| Kostoj de afranko k.s. | 5 288 | (12 055) | (8 712) |
| Kostoj de informado k.s. | 1 958 | - | - |
| Veturkostoj estraranaj | - | (13 894) | - |
| Eldono identecŝildaro | 449 | | |
| Gajno por la jaro | 22 975 | - | (5 636) |
| | 50 299 | (43 319) | (21 189) |

| Rimedoj | 1989 | (1988) | (1987) |
|---|---|---|---|
| Membrokotizoj | 25 501 | (23 228) | (15 662) |
| Donacoj kaj krompagoj | 23 894 | (7 589) | (2 557) |
| Gajno pro peradvendo reklamanoncoj k. kurtaĝoj | 904 | (3 555) | (2 970) |
| Malgajno por la jaro | - | (8 947) | - |
| | 50 299 | (43 319) | (21 189) |

## Bilanco je 1989.12.31

| Aktivo | 1989 | (1988) | (1987) |
|---|---|---|---|
| Komerca terminaro | 25,135 | | |
| Biblioteko, ekipaĵoj | p.m. | (1 422) | (896) |
| Poŝtĉekkonto belga | 3 601 | (13 032) | (20 297) |
| Konto ĉe UEA | 7 770 | (12 604) | (9 703) |
| Konto ĉe FEL | 18 475 | (2 321) | (3 570) |
| Ŝparkonto ĉe FEL | 13 031 | (13 210) | - |
| Debitoroj diversaj (Braun) | 319 | - | (890) |
| | 68 331 | (42 589) | (35 356) |

| Pasivo | 1989 | (1988) | (1987) |
|---|---|---|---|
| Kotizoj antaŭpagitaj | 10 394 | (8 691) | (6 263) |
| Kapit. dumvivaj membroj | 13 031 | (13 210) | (13 815) |
| Subtena fondaĵo | 3 364 | (504) | (504) |
| Kreditoroj diversaj (Gilbert) | 14 159 | (15 776) | (1 419) |
| Kapitalo<br>4408 (13355) (7719)<br>*gajno 22975 (-8947) (5636)*<br>nete 27383 (4408)(13355) | 27 383 | (4 408) | (13 355) |
| | 68 331 | (42 589) | (35 356) |

## Administrado

Grava atentigo al niaj membroj!

1. La estraro prezentas sur la paĝoj 9 ĝis 11 sian raporton pri la agado de IKEF dum la jaro 1989 kaj proponas aprobon de tiu raporto.
2. La estraro prezentas sur la paĝoj 5 ĝis 7 la financan raporton de IKEF por la jaro 1989, notante, ke la ciferoj de la raporto estas prezentitaj en bona tempo al la kontrolo de la revizoro. D-ro Polerani juĝis ilin bonaj kaj en ordo. Tial la estraro proponas aprobon de tiu financa raporto.
3. La estraro notas la sumon de financa gajno de 22975 belgaj frankoj kaj proponas aldonon de tiu gajno al la kapitalo.
4. La estraranoj s-ro **Braun** kaj d-ro **Picasso**, elektitaj en 1988 dum nia ĝenerala kunveno en Roterdamo, baldaŭ estos du jaroj en siaj oficoj. Laŭ la statuto de IKEF, alineo 7.1 dua frazo, estrarano tenas sian oficon dum du jaroj. Do ilia estraraneco finiĝas en julio ĉi-jare. Reelekto eblas. Ambaŭ pretas denove kandidatiĝi.

   En la nomo de IKEF, la aliaj estraranoj dankas ilin pro la laboroj faritaj dum la pasintaj du jaroj kaj proponas al la membraro reelekton de s-ro **Braun** kaj d-ro **Picasso**.
5. Nia statuto, alineo 7.4 kaj 8, montras la procedon pri aprobo kaj de la raporto pri agado kaj de la financa raporto, kaj pri elektoj de estraranoj. Ĉi-jare ni <u>ne</u> okazigos ĝeneralan kunvenon dum la Universala Kongreso en Havano, Kubo.

   En tia kazo la statuto diras, ke aprobo de ambaŭ raportoj okazos aŭtomate du monatojn post publikigo, escepte ke pli ol duono de la membroj skribe indikas malaprobon al la Generala Sekretario.

   Sed elekto de estraranoj ne okazas aŭtomate; la statuto preskribas <u>perpoŝtan voĉdonadon</u>. Do, ni petas vin, ke vi nepre partoprenu en tiu perpoŝta voĉdonado. Gis nun estas du kandidatoj por la du vakontaj postenoj: s-ro **Braun** kaj d-ro **Picasso**. Se vi proponas alian kandidaton, bonvolu prezenti ĝis 1990-06-30 lian nomo kaj lian personan deklaron pri preteco al la estrarofico al

   s-ro F.-X. Gilbert, Vert Coteau,
   Longeville-en-Barrois, F-55000 Bar le Duc.

   S-ro Gilbert poste sendos al la membroj la liston pri kandidatoj kaj aranĝos ka elekton.



## Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 1989

<u>Membraro denove kreskis</u>

Dum la jaro 1989 la membraro denove kreskis, nome de 74 komence de la jaro al 79 je la jarfino. Inter la 79 membroj estas ankoraŭ unu Dumviva Membro, nome s-ro **Voit** (IKEF 17); la dua s-ro **Mee**, dum la jaro eksiĝis. La nombro de perantoj plialtighis je unu, nome de s-ro **Piérard** por Svislando, al ok.

<u>Generala Kunveno 1989 en Brajtono</u>

La Generala Kunveno de IKEF-membroj okazis kadre de la 74a Universala Kongreso en Brajtono, Britio, je la 4a de aŭgusto 1989. Gi elvokis denove grandan intereson. Krom 20 IKEF-membroj ĉeestis ĉirkaŭ 20 interesitoj, kiuj vigle kundiskutis. La estraranoj **Braun**, **Rotsaert** kaj **Gilbert** gvidis la kunvenon.

<u>Laŭokaza Novaĵletero fariĝis "La Merkato"</u>

Nia komunikilo kvarfoje dum 1989 aperis. Ekde julio okazis tiurilate gravaj shanghoj. Ghi nomighas nun "La Merkato", aludante al la kampo, sur kiu ni komercistoj kaj ekonomi(k)istoj agadas. Post demisio de la ĝisnuna redaktoro, s-ro **Mee**, transprenis s-ro Daniel **König**, Mannheim, FR Germanio (IKEF 54), la taskon de redaktoro. La dissendadon organizas favorkoste nia Financa Konsilanto Roland **Rotsaert** helpe de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno. Espereble post kelkaj startproblemoj "La Merkato" pli kaj pli reguliĝos, pliriĉiĝos kaj fariĝos leginda komunikilo inter ni ĉiuj.

<u>Terminika laboro maturigis unuan frukton</u>

La terminara sekcio de IKEF sub kunordigado de s-ro **Wiersch**, Welzheim, FR Germanio (IKEF 19), finis sian traduklaboron pri la kvinlingva terminaro de la Internacia Komerca Cambro, "Key words in international trade" (Ŝlosilvortoj de internacia komerco). IKEF presigis 300 provekzemplerojn nomitajn "Komerca Terminaro" kun Esperanto kiel sesa lingvo. Gi estis prezentata kaj vendata dum la UK en Brajtono.

Ankoraŭ en 1989 la sekcio komencis la tradukon de la terminaro "Economie - Finance - Monnaie" (Ekonomio - Financo - Mono) de la Eŭropa Komunumo. Ni celas prezenti ĝin dum ĉi tiu jaro.

<u>Nova emblemo ankoraŭ ne trovita</u>

En la aprila kajero de la Laŭokaza Novaĵletero ni alvokis niajn membrojn al elekto de nova emblemo por IKEF. Sed la sukceso estis ege modesta. Nur 15 procentoj el niaj membroj reagis kaj voĉdonis. La voĉoj dispartiĝis samnivele sur la tri proponoj, tiel ke ni ne povis tiri rezulton.

## Verka agado plifortigita

Pli da IKEF-membroj ol en antaŭaj jaroj aktiviĝis dum 1989. Ili raportis pri diversaj aferoj en revuo MONATO, kie ankaŭ aperis pluraj reklamanoncoj de entreprenoj. Ankaŭ dum la raporta jaro nia membro d-ro **Goldman** (IKEF 52) ĉiumonate regule eldonis sian "Ekonomian Bultenon pri Usono", kies abonon ni varme rekomendas al vi. Bedaŭrinde ni ne sukcesis establi similajn bultenojn pri Eŭropo (Eŭropa Komunumo) kaj pri Japanio aŭ la orientazia regiono, kiu pli kaj pli graviĝas en la mondekonomio. Volonte ni akceptus aŭtorojn el niaj membroj en Eŭropo kaj orienta Azio, kiuj kapablus establi tiajn bultenojn.

Meritas laŭdon ankaŭ la revuo FOKUSO, popular-scienca serio de Hungara-Esperanto-Asocio. Gi estas ĉefe ellaborata de Ekonomikista Grupo de HEA (nomita EKOESP), niaj membroj (IKEF 24). Ni denove rekomendas al vi la abonon de FOKUSO.

Ankaŭ sur universitata nivelo IKEF aktivis. Nia membro d-ro **Bormann**, FR Germanio (IKEF 27), lekciis dum aŭgusto kaj septembro en AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj), San Marino. Por tio li verkis 58-paĝan broŝuron "Konjunkturpolitiko" kun la subtitolo "inter senlaboreco kaj inflacio". En ĝi li tre bone montras la ondojn de ekonomia konjunkturo, la kaŭzojn por tio kaj la politikajn rimedojn por ebenigi ilin.

Nia estrarano s-ro **Gilbert**, Francio (IKEF 14), okupiĝis pri la reto de niaj membroj. Li kolektis en aparta broŝuro "Identecŝildaro" la identecŝildojn de niaj membroj, kiuj jam estis aperintaj en la Laŭokaza Novaĵletero. Gi aperis ĵus antaŭ la Brajtona UK. Konsciante pri la graveco de interkomunikado inter niaj membroj por efika agado, li volis helpi al kontaktiĝo kaj interkonatiĝo. Bedaŭrinde ne ĉiuj membroj estis disponigintaj detalajn informojn pri si mem, kaj pro rapida kresko de nia membraro la identecshildaro baldaŭ estos malaktuala. S-ro **Gilbert** certe eldonos novan kompletigitan broŝuron dum 1990.

Gravan sukceson spertis ankaŭ s-ro **Wiersch** (IKEF 19). Li sukcesis, en germanalingva "Lexikon der Public Relations" (Leksikono pri publikaj rilatoj), Verlag Moderne Industrie, Landsberg, aperigi sep kolumnojn kun la titolo "Public-Relations-Sprache: Esperanto", en kiu li asertis la taŭgecon de Esperanto ankoraŭ en publikaj rilatoj.

## Aktivaj negocistoj inter IKEF-anoj

Kvankam IKEF mem ne negocas, tamen okazas pli kaj pli, ke opaj membroj faras negocon inter si kaj uzas ĉe tio la internacian lingvon. Ekzemple vizitis nia prezidanto s-ro **Braun** (IKEF 4) lastjare sudan Ĉinion kaj helpe de Esperantisto s-ro **Du** (IKEF 80) li vizitis kelkajn firmaojn. Pri tio aperis artikolo en "El popola Ĉinio", nr-o 9/89,



COVALEX S.A.

CHEMIN DES VOIRAMBEYS
CH - 3974 MOLLENS
(SVISLANDO)

... JAM DE LONGE KONAS
LA FABRIKANTOJN DE LA ALTKVALITAJ PRODUKTOJ
KIUJ NUR EN SVISLANDO EKZISTAS
KAJ KIUJN VI NE ANKORAŬ TROVIS

...AŬ ELEKTRONIKAJ EROJ
...AŬ VINOJ
...AŬ ŜIPOJ
...AŬ BANKAJ SERVOJ
...AŬ ...???...ĈU NE ?

PROFESIE - FIDINDE - DISKRETE

ELDONAS KOMPUTERPROGRAMOJN (IBM AŬ KONGRUAJN)
ŜANĜAS, ADAPTAS ELEKTRONIKAJN INFORMOJN EL UNU AL ALIAN SISTEMON (DISKOJ - DISKETOJ 8"+5"+3")

TELEFONO ++-41-27 / 41 62 45
TELEFAKSO ++-41-27 / 41 90 65 ("FAX")

paĝo 14, "Vizito en Shenzhen - Praktika uzo de Esperanto en komerco". En sia profesio kiel estro de aĉetsekcio de granda germana entrepreno li sukcese povis instali komercajn rilatojn kun firmao en Hong Kong surbaze de Esperanto, kaj same li baldaŭ aĉetos varojn en Hungario uzante Esperanton. S-ro Lee, Hong Kong (IKEF 11), posedanto de la firmao Espero Enterprises, ĉiam strebas al uzo de Esperanto en siaj komercaj aferoj.

## Resumo: Multepromesaj perspektivoj

La kvanto kaj kvalito de IKEF-agadoj kreskas. La financa situacio de IKEF estas stabila. La perspektivoj por IKEF ŝajnas favoraj.

Por la estraro, Braun, Prezidanto

## En Pollando eksterlandaj investoj

La pola registraro kaj la organizo de unuiĝintaj nacioj por la industria kreskado (ONUDI) organizas en Varsovio, de la 21a ĝis la 24a de majo 1990, industria forumo. Dum ĉi tiu, pli da 230 projektoj estos prezentataj de la iniciatintoj, relative al ĉiuj industriaj sektoroj. Okazos paroladoj de gravaj polaj kaj internaciaj eminentuloj.

**Bonvenon al niaj novaj aliĝintoj!**

S-ro Francesco Carlucci, (IKEF 99), Largo Plebescito 72, I-85045 Lauria (PZ)

S-ro Roland Pourquie, (IKEF 100), Sarl de Presse "de Plaisance", Z. I. de la Pâquerie, B. P. no. 4, F-37110 Villedomer, Francio

S-ro Georges Sossois, (IKEF 101), Rue de Bassin 79, B-Marcinelle, Belgio; telefono: 071-436205
*profesoro pri lingvoj kaj ekonomiaj sciencoj, prezidanto de la Belga Esperanto-Federacio (BEF) kaj de l'Asocio por Esperanto (APE)*

Sekcio de Ekonomiaj Esploroj de l'Asocio por Esperanto, (IKEF 102), Route de Wasseiges 41, B-5052 Hanret-Eghezee, Belgio

S-ro Claude Haegeman, (IKEF 103), Route de Wasseiges 41, B-5052 Hanret-Eghezee, Belgio; telefakso: 081-436205

---

**IKEF-anoj transloĝiĝis:**

S-ro Rob Ebenau, (IKEF 63), Bredabaan 408, B-2170 Wuustwezel, Belgio; telefono: 03-6696701

S-ro Clair Mahe, (IKEF 81), Rue Henri-Barbusse, F-63500 Issoire, Francio

---

**Suplemento: Identecŝildaro**

S-ro François-Xavier Gilbert respondecas la kolekton de identecŝildoj de la IKEF-membroj. Li prezentas al ni aldonon al la lastjare aperinta Identecŝildaro de novaj membroj; ĝi situas ĉi ene kiel suplemento en la mezo.

Membroj kiuj ankoraŭ ne informis lin pri si, sentu vin invitata sendi al s-ro Gilbert vian Identecŝildon. (La adreso trovighas che *Peranto, Francio*)

---

Subskribintoj respondecas pri la enhavo de siaj artikoloj. La aperigo entute ne signifas samopinion, nek de la eldonanto, nek de la redaktoro.

---

La rajtoj de represo estas malferma, kondiĉe ke la fonto estas klare indikota. Pruvekzempleroj estas petataj.

---

Reklamtarifoj, en belgaj frankoj: tutpaĝe 1800; ½ paĝo 900; ¼ paĝo 500. 33% rabato por tri-foja sinsekva aperigo de la sama anonco. Membroj ĝenerale ricevas rabaton de 25%.

Akiri anoncojn estas ege utila rimedo por subteni nian movadon; eĉ duflanke ekonomie: *finance* kaj *reputacie*. /dk

Aldono al La Merkato - n-ro 30

Pro diversaj kialoj ne aperis la identecŝildoj de la novaj IKEF-anoj en la lastaj numeroj de La Merkato. Jen parta listo ; aliaj sekvos.

**Aliĝinto al IKEF n° 88**

Nomo : LUKACS
Antaù : Andras

Profesio : Redaktoro kaj sekretario

Nomo de la
Firmao : FONDAĴO TALENTO

Profesia adreso :
Strato : Pf 50
Urbo : H 2041 BUDAÖRS
Lando : Hungario

Telefono : (36 1) 173 3008
Telekso : 182 3225
Telefakso :
Teletekso :

Privata adreso :
Strato : Szivarvany U. 4/36
Urbo : H 2040 BUDAÖRS
Lando : Hungario
Telefono : 173 3008

Lingvaj eblecoj :
Hungara - Esperanta - Angla - Rusa
(Franca kaj Hispana : legkapablo)

Kompetentecoj :
Medioprotektado, edukado, libroeldonado, Esperanto-aplikado.

Diversaj :

Naskiĝdato : 1951 12 17

**Aliĝinto al IKEF n° 89**

Nomo : LAMILY
Antaù : Hussain

Profesio : Eksport-Import-Estro

Nomo de la
Firmao : KEYWORK ENTERPRI[illegible] LTD

Profesia adreso :
Strato : 1 Harman Close
Urbo : LONDON NW2 2EA
Lando : Anglio

Telefono : 01 574 5044
Telekso : 917544 SPACE G
Telefakso : (01 828 9316
(01 706 3537
Teletekso :

Privata adreso : Grosvenor House 63
Strato : 35-37 Grosvenor Place
Urbo : LONDON SW1W 0B5
Lando : Anglio
Telefono : 01 931 7436 & 574 5044

Lingvaj eblecoj :
Araba - Angla - Esperanta
Malpli : Franca Germana Persa.

Kompetentecoj :
Internacia komerco, verkado pri araba-islama kulturo.

Diversaj :
Advokato por la Organizo de U.N. kiel kerno de monda paco kaj progreso surbaze de komuna utilo de naturaj riĉaĵoj kaj homara scio. Universalaj registaro kaj helplingvo Esperanto nepro estu la unua paŝo al ties efektivigado.

Naskiĝdato
07 [illegible] BAGHDAD

**Aliĝinto al IKEF n° 92**

Nomo : CHRETIEN
Antaù : Jacques

Profesio : Bankisto - emeritulo

Nomo de la
Firmao : CAISSE NATIONALE de CREDIT AGRICOLE

Profesia adreso :
Strato :
Urbo :
Lando :

Telefono :
Telekso :
Telefakso :
Teletekso :

Privata adreso :
Strato : 12, Avenue des Chênes
Urbo : F 63000 NICE
Lando : Francio
Telefono : 93 56 01 96

Lingvaj eblecoj :

Kompetentecoj :

Diversaj :

Naskiĝdato

**Aliĝinto al IKEF n° 93**

Nomo : BERX
Antaù : Peter

Profesio : Studanto pri industria interpretado

Nomo de la
Firmao :

Profesia adreso :
Strato :
Urbo :
Lando :

Telefono :
Telekso :
Telefakso :
Teletekso :

Privata adreso :
Strato : Klein Kloosterstraat 17
Urbo : B 3820 ALKEN
Lando : Belgio
Telefono : (011) 31 26 20

Lingvaj eblecoj :
Nederlanda - Franca - Angla - Germana - Esperanta.

Kompetentecoj :
Pri internaciaj komercaj aferoj.

Diversaj :

Naskiĝdato : 09 07 1964

Aliĝinto al IKEF n° 94

Nomo : MARRON

Antaŭ : Brendan

Profesio : Eks konsilisto pri karieroj
Tradukisto vendestro ĉe gazeto

Nomo de la
Firmao : LÁ

Profesia adreso :
Strato : 102 B Andersonstown Rd
Urbo : BELFASTO
Lando : Nord Irlando

Telefono :
Telekso :
Telefakso :
Teletekso :

Privata adreso :
Strato : Corrib Avenue
Urbo : BELFASTO
Lando : Nord Irlando
Telefono : 0232 62 32 59

Lingvaj eblecoj :
Galea - Angla - ĉefaj Europaj lingvoj kaj iom da rusa.

Kompetentecoj :
Spertò ĝenerala pri komerco kaj ekonomio.

Diversaj :

Naskiĝdato : 6 a de Aprila 1930



Aliĝinto al IKEF n°

Nomo : POURQUIE

Antaŭ : Roland

Profesio : Estro

Nomo de la
Firmao : SARL de Presse de PLAISANCE

Profesia adreso :
Strato : ZI de la Pâquerie BP 4
Urbo : 37110 VILLEDOMER
Lando : Francio

Telefono : (33) 47 66 52 32
Telekso : 752401 F
Telefakso : (33) 47 64 88 54
Teletekso :

Privata adreso :
Strato : 21 Rue dd la Castellerie
Urbo : 37550 SAINT AVERTIN
Lando : Francio
Telefono : (33) 47 27 20 83

Lingvaj eblecoj :
Esperanta

Kompetentecoj :
Industria publikaĵo

Diversaj :
Eldonisto de"Intersangoj - Industrioj"

Naskiĝdato

Aliĝinto al IKEF n° 81

Nomo : MAHE

Antaŭ : Clair

Profesio : Eksporta Agento

Nomo de la
Firmao : CEGEDUR PECHINEY RHENALU

Profesia adreso :
Strato : B.P. 130
Urbo : 63504 ISSOIRE Cédex
Lando : Francujo

Telefono : 73 55 51 77
Telekso : 990960 CEGEDUR F
Telefakso : (33) 73 55 51 76
Teletekso :

Privata adreso :
Strato : Rue Henri Barbusse
Urbo : F 63500 ISSOIRE
Lando : Francio
Telefono :

Lingvaj eblecoj :
Franca - Esperanta - Hispana - Angla - Germana.

Kompetentecoj :
Personaj hodiaŭaj :
- Produktoj : laminatitaj ladoj/bendoj el aluminialojoj, precipe grand-dimensiaj por transportil fabrikado, kaldronindustrio kaj revendistoj.
- Landoj : Azio, Scandinavio.

Diversaj :

Naskiĝdato : 22 2 1947



Aliĝinto al IKEF n° 86

Nomo : KHOSHMASHRABAN

Antaŭ : Ali

Profesio : Komercisto

Nomo de la
Firmao : RASEM Co.

Profesia adreso :
Strato : 1000/2 Vali-e-Asr Ave.
Urbo : TEHRANO 14338
Lando : Iran

Telefono : 621951
Telekso : 222549
Telefakso :
Teletekso :

Privata adreso :
Strato :
Urbo :
Lando :
Telefono :

Lingvaj eblecoj :
Esperanta - Angla.

Kompetentecoj :
Importaĵoj :
Inĝenieraj instrumentoj
Skribilaroj
Oficejaj Maŝinoj

Diversaj :

Naskiĝdato : Majo 1944